# Fenikso

Revuo de Esperanto Nederland

Jarkolekto 30 - n-ro 1 ★ Januaro - Februaro 2025



**Nederlando**
Fotogalerio de la studosemajnfino 10

**Nederlando**
Junaj esperantistoj en Nord-Brabanto 12

**Internacie**
Volontulado en la Domo de Mateo 16

# Fenikso
Revuo de
Esperanto Nederland

Dumonata membrogazeto de Esperanto Nederland
**ISSN 1384 - 6515**


★

Membroj de Esperanto Nederland ricevas la gazeton. La jara kotizo estas €40,- por membroj pli ol 30-jaraj, €15,- por membroj ĝis 30-jaraj kaj €15,- por samhejmano.

Vidhandikapitoj povas ricevi kasedan version, aranĝitan de Rob Moerbeek. Petu abonon ĉe
redakcio@esperanto-nederland.nl


**Kunlaborantoj de *Fenikso***
**Ĉefredaktoro**: Paweł Fischer-Kotowski
**Redaktoroj**: Thijs van Viegen, Paweł Fischer-Kotowski
**Korektantoj**: Bert de Wit, Inge Demmendaal
**Konsilanto**: Ineke Emmelkamp


Limdato: Materialo por la sekva numero estas bonvena **ĝis la 10-a de marto 2025.**


**Informoj pri Esperanto**
Ineke Emmelkamp
Arubastraat 12, 9715 RW Groningen
info@esperanto-nederland.nl
050 571 88 42

**Studosemajnfino/studieweekend**
studosemajnfino@esperanto-nederland.nl

**Esperanto Nederland enrete**
https://www.esperanto-nederland.nl
https://facebook.com/esperanto.nederland
https://t.me/EsperantoNederland
https://twitter.com/EsperantoNL

**Sendu viajn kontribuojn al**
redakcio@esperanto-nederland.nl


Respondu al artikoloj per maksimume 200 vortoj. La redakcio decidas pri la publikigo de la tekstoj.

## Estraro


estraro@esperanto-nederland.nl

**Prezidanto**: Marc van Oostendorp
Nederlandse Taal en Cultuur
Radboud Universiteit Nijmegen
Postbus 9103 6500 HD Nijmegen
prezidanto@esperanto-nederland.nl

**Sekretario**: Rob Groeneveld
Scharounlijn 44, 2728 BT Zoetermeer
06 19 77 35 27
sekretario@esperanto-nederland.nl

**Kasisto**: Loes Demmendaal
Duikerlaan 160, 2903 AC Capelle a/d IJssel
kasisto@esperanto-nederland.nl

**Estrarano**: Peter van Noorden
Tamarixplantsoen 203, 1702 JD Heerhugowaard
petervn@esperanto-nederland.nl
06 22 61 32 49

**Estrarano**: Ineke Emmelkamp
Arubastraat 12, 9715 RW Groningen
informado@esperanto-nederland.nl

**Membro-administranto**: Koos Scharroo
Vaartweg 24G, 8382 EB Frederiksoord
membroj@esperanto-nederland.nl
06 22 41 32 67


Ekz. informi pri (ŝanĝoj de) poŝtadreso, telefonnumero, retpoŝtadreso, (eks- kaj ali)membriĝo, pagmaniero ktp.


**Pri sociaj komunikiloj**
sociaj-komunikiloj@esperanto-nederland.nl

**Bankkonto**:
IBAN: NL 10 TRIO 0786 8441 67
Nome de Esperanto Nederland
Capelle a/d IJssel

**Eventuala resendadreso/eventueel retouradres**:
Esperanto Nederland Ledenadministratie
Vaartweg 24G, 8382 EB Frederiksoord




## En la numero


| | |
|---|---|
| **Nederlando** | **5** |
| Novjara saluto | 5 |
| Lerni kaj amuziĝi en Krikkenhaar | 10 |
| Ĉeĥa surprizo kaj malkovro en Amsterdamo | 13 |
| Nekrologoj | 15 |
| **Internacie** | **16** |
| Volontulado en la Domo de Mateo | 16 |
| Novaĵoj | 17 |
| **Ceteraĵoj** | **19** |
| Jen mi! | 19 |
| Kiel rapide moviĝas elektrono tra kupra drato? | 21 |














## Sur la kovrilpaĝo

Bildo: Ineke Emmelkamp

De la 8-a ĝis la 10-a de novembro 2024 okazis la studosemajnfino en Krikkenhaar. Pri tiuj tagoj vi trovos fotogalerion sur **paĝoj 10 kaj 11**.

## Voorwoord

Voor je ligt het eerste nummer van *Fenikso* van 2025. Daarom is op **pagina 5** een nieuwjaarsgroet van Marc van Oostendorp opgenomen in dit nummer.

In dit nummer blikken we onder andere terug op een geslaagd studieweekend in november. Foto's van het weekend vind je op **pagina's 10 en** 11.

Recent zijn jonge esperantisten op stap gegaan in Noord Brabant. Samen bezochten ze het *Weverijmuseum*. Verslag daarvan vind je op **pagina 12**.

Op 10 mei vindt de jaarvergadering plaats van Esperanto Nederland. De agenda daarvoor is terug te vinden op **pagina 9**. De notulen van 20 april 2024 staan op **pagina's 6 tot en met 8**.

We staan in deze *Fenikso* stil bij het overlijden van drie Nederlandse esperantisten. Ook onder *Internacie* zijn twee berichten van overlijden te vinden.

In dit nummer van *Fenikso* zul je ook wat teksten aantreffen die in het Esperanto geschreven zijn, maar niet per se over onze geliefde taal gaan. Kijk daarvoor op **pagina 21** of **pagina 13**.

Onder *Ceteraĵoj* vind je vanaf dit nummer de nieuwe rubriek *Jen mi!* In deze rubriek zetten we elke keer een andere Esperantist in Nederland in de spotlights. In deze eerste editie komt Maike Bouma aan bod. Je vind het artikel op **pagina 19**.

Vanaf dit nummer verschijnt de rubriek *Lingva testeto* niet meer. Wij bedanken de maker van die rubriek, Arjen-Sjoerd de Vries, voor zijn langdurige en waardevolle inzet voor *Fenikso*.

Wij hopen dat we met deze *Fenikso* weer een goed beeld geven van wat er speelt rondom Esperanto in Nederland en daarbuiten. In ieder geval wensen wij je ook dit jaar weer veel leesplezier.

*Paweł en Thijs*

La estraro kunvenis per Zoom la 23-an de novembro. La redaktoroj de *Fenikso* ĉeestis parton de la kunveno. Pluraj ideoj pri *Fenikso* estis pridiskutataj.

La estraro priparolis la protokolon de la pasinta ĝenerala kunveno en aprilo 2024 kaj la tagordon de la venonta ĝenerala kunveno en 2025. Ambaŭ dokumentoj aperas en ĉi tiu numero de *Fenikso*.

La buĝeto kaj laborplano por la jaro 2026 (aprobotaj de la ĝenerala kunveno) estos determinitaj de la estraranoj aktive, do ne nur proponitaj de la kasisto. Ni devos bone pripensi la venontan buĝeton.

La kultura tago okazos sabate la 14-an de junio 2025 en Alkmaar. Helpos la organizantojn la organizintoj de la kultura tago en Zutphen. La kultura tago en 2026 okazos en Eindhoven.

En 2025 okazos Germana-Beneluksa (Gebeneluksa) Kongreso de la 2-a ĝis la 5-a de oktobro en Schleiden, Germanio. Al la kongreso estos ligita Erasmus+-projekto kun la titolo *Paco per interkompreniĝo: kiel fortigi partnerajn rilatojn?* La estraro subtenas la projekton, sed ni ne kapablos organizi plurtagan kunvenon en Nederlando.

En la studsemajnfino komence de novembro estis 41 partoprenantoj. 2 tranoktis en la dometo Op den Haar malantaŭ la Nivon-domo. En 2025 okazos la unua studsemajnfino de la 4-a ĝis la 6-a de aprilo kaj la dua de la 7-a ĝis la 9-a de novembro.

La estraro decidis mendi 1000 ekzemplerojn de libreto kun gramatiko kaj vortlisto ('sleuteltje').

Ineke kaj Rob donis dekojn da Esperanto-libroj, el heredaĵoj de forpasintaj esperantistoj, al la *Koninklijke Bibliotheek* (Reĝa Biblioteko). Restas aliaj libroj el la heredaĵoj por la membroj, mendeblaj ĉe la adreso **informado@esperanto-nederland.nl**. La asocio donacis jenajn librojn al la biblioteko de la Universitato de Amsterdamo:

- *Esperantologio/Esperanto Studies*; nova serio 5 (13)
- *La blindulo, kiu surprizis la mondon* – Vasilij Eroŝenko
- *Vortfarado en Esperanto* – Wim Jansen
- *Baza sŭahila gramatiko*
- *Vortaro haŭsa-Esperanto kaj Esperanto-haŭsa*

Kiel antaŭe anoncite, en 2025 okazos estrarkunveno en Utrecht sabate la 1-an de februaro kaj la ĝenerala kunveno okazos sabate la 10-an de majo.

La estraro invitas proponojn por la Verloren van Themaat-premio pri 2024. Ĉi tiu premio povas esti ĉiujare aljuĝata al persono kiu dum unu jaro (do, nun en 2024) publikigis aŭ igis publikigi la plej bonajn informojn pri la lingva problemo kaj/aŭ Esperanto en landaj, regionaj, lokaj aŭ sociaj medioj. Kopiojn de la informoj vi sendu al: **sekretario@esperanto-nederland.nl**.

La nova asocia retejo estos prezentita dimanĉon la 9-an de februaro dum la kunveno de La Amsterdama Rondo.

La rubriko *Bonvenon!* ne aperas nun, ĉar ne aliĝis novaj membroj.

*Rob Groeneveld*
*Sekretario de Esperanto Nederland*







# Novjara saluto de la Prezidanto



Kiam mi lastatempe vizitis prof. Federico Gobbo, "nian" profesoron ĉe la Universitato de Amsterdamo, li diris al mi ion surprizan: la intereso pri lia Esperanto-kurso kreskas inter la nuntempaj studantoj. "Kiel tio eblas?", mi demandis lin. "En ĉi tiuj strecaj tempoj", li klarigis, "junuloj sopiras ion, kio estas ne-agresema, kio promesas pacon."

Ni eniras la novan jaron en epoko de multaj konfliktoj tra la mondo, sen klara solvo. La registaroj ĉie en Eŭropo emas fermi la landlimojn. La eksa ĉefministro de Nederlando, kiu nun gvidas Nord-Atlantikan Traktat-Organizon (NATO), ĵus instigis nin prepariĝi por milito.

Kvankam la Esperanto-movado neniam sukcesis haltigi militon, ĝi dum 137 jaroj proponas alternativon: malgrandan mondon, kie homoj povas kunvivi alimaniere. Homoj sopiras al tia alternativo.

Esperanto Nederland estas modesta, sed stabila parto de tiu malgranda mondo: asocio, kiu en la lastaj jaroj ne nur konservis sian stabilecon, sed eĉ iom kreskis. Ĉiujare ni organizas du tre popularajn studsemajnfinojn, ĉiujaran Kulturan Tagon kaj eldonas belan revuon. Baldaŭ ni ankaŭ lanĉos tute novan retejon, kiu celas montri al Nederlando, kio estas Esperanto, kaj al la tutmonda movado, kio estas Nederlando.

Ni vivas en strecaj tempoj, kiel diras Gobbo. Tamen, ni ankoraŭ havas la ŝancon montri, ke aferoj povas esti farataj alimaniere. Ĉion bonan por la nova jaro!

*Marc van Oostendorp*
*Prezidanto de Esperanto Nederland*

# Protokolo de la 33-a ĝenerala kunveno de Esperanto Nederland

*Dato: la 20-a de aprilo 2024.*
*Loko: De Kargadoor, Oudegracht 36, 3511 AP Utrecht.*
*Tempo planita: ekde 13:15a horo.*
*Ĉeestis la estraro: Marc van Oostendorp, prezidanto, Ineke Emmelkamp, sekretario, Loes Demmendaal, kasisto, Peter van Noorden, estrarano.*
*Ĉeestis 14 membroj (inkluzive la estraron) kaj 1 gasto.*
*Federico Gobbo kaj 1 membro partoprenis rete.*
*Envenis 3 mandatoj.*
*Prezidis: Marc van Oostendorp.*
*Protokolis: Rob Groeneveld.*

## 1. Malfermo de la ĝenerala kunveno

- La prezidanto malfermis la kunvenon.
- La ĉeestantoj ekstaris kaj honoris la forpasintajn membrojn dum momento da silento:
  S-ino Fimke Kalsbeek, s-ro Joop Moonen kaj s-ro Ton Olgers.
- La voĉdonadon kalkulos Ralph Schmeits kaj Ans Bakker

## 2. Fikso de la tagordo kaj envenintaĵoj

Ne ĉeestos Ronaldo Nobel, Hiddo Velsink, Arjen-Sjoerd de Vries, Derk Ederveen, Lilian van der Burgt, Terry Vogelaar kaj Coen Beeker. Ne estis ŝanĝo en la tagordo.

## 3. Protokolo pri la 32a ĝenerala kunveno

Ne estis rimarkoj pri la protokolo. La prezidanto dankis Rob Groeneveld, kiu faris ĉi tiun protokolon.

## 4. Agadraporto pri 2023

Ineke: ĉu estas demandoj aŭ aldonoj? Ne estis. La raporto estis akceptita. Loes faris komenton: mi ĝojas ke dum jaroj la membronombro kreskas. Venis 16 novaj membroj lastjare; tre bona rezulto. Ans Bakker aldonis: estas pli kaj pli da aktivado en la lando, ekz-e en Zutphen kaj Vlissingen. Mi ĝojas pri tio. Ineke: aperis artikoloj en la gazetaro kiuj atentigis pri Esperanto. Marc: en la agadraporto punkto 11.3: por mi ne estas klare ĉu vere ekzistas NEJ.

## 5. Financaj raportoj pri 2023

### *5.1. Raporto de la kaskontrol-komisiono*

Ans Bakker: Temas pri kaskontrolo pri la jaro 2023. Ans laŭtlegis la raporton. La membrokunveno malŝarĝis la estraron laŭ la peto de la komisiono.

### Kaskontrolo 2023, Esperanto Nederland

Je la 22-a de marto 2024 ni kontrolis la financan jarraporton de Esperanto Nederland. Niajn demandojn respondis la estrarano pri financoj, Loes Demmendaal.

Klarigojn vi legas en la financa jarraporto. Ni konstatas ke ĉio estas bone registrita.

Al la membroj, estantaj en la ĝenerala membro-kunveno ni petas malŝarĝi la estraron.

*Smaranda Tintu kaj Ans Bakker - ten Hagen*
*2024-03-22, Capelle aan den IJssel*

### *5.2. Rezultkonto pri 2023 kun klarigoj*

Kompare al la buĝeto, la deficito estas konsiderinde malpli. Envenis pli da kotizoj ol antaŭvidite. La granda ŝoko estis sub punkto 15: la puno, kiun ni devis pagi kaj juraj kostoj, kiujn ni devis pagi pro tre malbona foto, kiu ne estis aŭtore rajtigita. La deficito estis preskaŭ € 7.000, el kiuj € 3.000 estas por la katedro kaj € 4.000 por la ĝeneralaj kostoj.

### *5.3. Bilanco je 31-12-2003*

Tie vi vidas ke estas la normalaj aferoj pri antaŭpagitaj kostoj kaj la kontoj ĉe bankoj kaj UEA. Ni metis monon ĉe UEA por povi pagi la kostojn, se la postulantoj blokus nian bankkonton. Tiu sumo poste revenis al nia ASN-konto. La propra kapitalo en la komenco estis € 93.000. La propra kapitalo malkreskis kaj nun estas € 86.000. Por la Amsterdama katedro Loes kolektis preskaŭ € 10.000 de privatuloj. Loes esprimis dankon al Ralph, kiu ĉiam helpas ŝin.

## 6. Proponoj

### *6.1. Propono de la estraro: fikso de la kotizoj por 2025.*

La estraro proponas ne ŝanĝi la kotizojn
La kunveno akceptis la proponon.

### *6.2. Buĝeto kaj laborplano 2025*

La rentumo estas pli alta. Ĉiuj aliaj aferoj estas pli-malpli samaj kiel kutime.



### *6.3. Plano por informado*

Bedaŭrinde ankoraŭ mankas tiu ĉi plano. Espereble ni havos planon por la sekva jaro.

## 7. Elektoj

### *7.1. Estraro*

Bedaŭrinde nia sekretario Ineke demisias. Rob Groeneveld dankis Ineke kaj donis al ŝi malgrandan donacon. La kunveno aplaŭdis ŝin. Ineke dankis por la donaco kaj diris ke ŝi tre ĝojas, ke Rob kandidatiĝas por tiu funkcio kaj ke tio plifaciligas ŝian vivon. La donaco estis por ŝia ĝardeno. Rob jam antaŭe plifaciligis la vivon por Ineke (*farante la protokolojn*). Ankaŭ Rob ricevis donacon (*forviŝeblan notlibron*).

Estis du kandidatoj: Rob estis kandidato kiel sekretario kaj Ineke estis kandidato kiel estrarano por informado.
(Dum la voĉdonado kaj kalkulado de la voĉoj 10 kartoj estis subskribitaj de la ĉeestantoj por 10 personoj, plejparte membroj kiuj ne povis ĉeesti. Per poŝtmarkoj de la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Strasburgo la kartoj estis afrankitaj.)

Raportis Ralph: Estis 14 ĉeestantoj en la salono. Ĉiuj voĉdonis. Envenis 3 rajtigiloj. La rezulto de la voĉdono estis 17 voĉoj. Rob ricevis 17 jesojn por sia nova posteno de sekretario kaj Ineke ricevis 16 voĉojn kaj 1 sindetenon kiel estrarano por informado. La kunveno aplaŭdis la anoncon. Ineke donis donacojn al Rob. Ŝi transdonis al Rob sakon kaj ujojn kun sekretariaj aferoj kaj poŝtmarkoj.

La prezidanto memorigis, ke li jam antaŭe estis en la estraro kaj ke ankaŭ Ineke tiam estis en la estraro. Li ne povas imagi, ke la asocio povus ekzisti sen ŝi.
(*Memorigo pri la estraraj periodoj:*
*Marc van Oostendorp 2022-2025 - unua periodo*
*Loes Demmendaal 2022-2025 - tria periodo*
*Peter van Noorden 2022-2025 - unua periodo*
*Ineke Emmelkamp 2024-2027 - dua periodo*
*Rob Groeneveld 2024-2027 - unua periodo)*

### *7.2. Kaskontrolkomisiono*

La nunaj membroj estas Smaranda Tintu kaj Ans Bakker. Rezerva membro estas Mariska de Jonge. Smaranda demisias. Ans kaj Mariska estas la membroj por la kontrolo de la jaro 2024. Kiel rezervan membron sin anoncis Peter Ebenau.

### *7.3. Komitatano A ĉe UEA*

Kvankam ni provis trovi iun, ni ne havas kandidaton. Ni daŭre serĉas tian homon.

## 8. Fenikso

Foppe-Klaas Hovinga: Mi ne havas planon por la venonta jaro, ĉar Paweł Fischer-Kotowski estos la nova redaktoro kun Thijs van Viegen. Mi kaj Andries Hovinga retiriĝos kiel redaktoroj. En la antaŭparolo de la sekva numero de *Fenikso* vi povos legi kion mi volas diri.
La prezidanto: nome de la estraro kaj de la asocio mi volas danki vin. Dum la antaŭa jarkunveno ni donis al vi la premion Verloren van Themaat por via aktivado. *Fenikso* estas la perlo de la asocio. Ĝi estas belega revuo, pli bela ol multaj aliaj revuoj en la movado. Ni dankas ankaŭ Andries. Ineke donis al Foppe-Klaas kaj Andries donacojn en sako, kun kelkaj poŝtmarkoj. La donacoj estis glasoj kun surskribo: 'Esperanto Fenikso membrogazeto'. La kunveno aplaŭdis.

## 9. Informado pri diversaj temoj

### *9.1. Kultura tago en Zutfeno*

Foppe-Klaas invitis ĉiujn veni al Zutphen. Li loĝas nur kelkajn jarojn tie kaj ĝi estas nova urbo por li, kvankam ŝatinda kaj interesa, vere malnova urbo. La temo por la kultura tago, en la 15a de junio, estas "Miaj revoj ĉe la horizonto". Estos riĉa programo kun muziko, poemoj, gvidado tra la urbo kaj aliaj aferoj, sed ankaŭ tempo por renkontiĝi. En la venonta *Fenikso* aperos invito kaj programo. Jam 20 personoj aliĝis.

### *9.2. Studsemajnfinoj*

Antaŭ unu semajno ni estis en Krikkenhaar. Entute estis 49 homoj, el kiuj 40 studentoj. En la porkomencanta grupo, kiun gvidis Rob, estis 5 personoj, kiuj ĉiuj restis ĝis la fino. Unu studento estas najbarino de Ineke, kiu nun regule diras al ŝi "Saluton!". Ankaŭ Mariska, Peter kaj Andries ĉeestis. La nombro de partoprenantoj estis rekordo. La nemembraj nederlandaj partoprenintoj de la studsemajnfino ricevos *Fenikso*-n kun la fotoj de la studsemajnfino. La venonta studsemajnfino okazos de la 8-a ĝis la 10-a de novembro inkluzive.

### *9.3. Informoj pri la nova retejo de Esperanto Nederland*

Foppe-Klaas prezentas la novan retejon. Ĝi havas tri celgrupojn: unue, la membrojn de Esperanto Nederland; due, aliajn nederlandanojn kiuj volas scii ion pri Esperanto, kaj trie eksterlandajn esperantistojn, kiuj volas scii ion pri la

movado en Nederlando. La dezajnistoj strebas al tio, ke ĉiun tekston en la retejo akompanu bildo.

### 10. Jubileantoj

***10.1. Ni honoras la membrojn kiuj festas sian 50-jaran membrecon***

Ni havas novajn, sed ankaŭ malnovajn membrojn. Ni ĉi-jare ne havas 25-jarajn membrojn, sed unu 50-jaran membron, nome Bert de Wit. Li aliĝis al FLE la 1-an de januaro 1974. Li estas longjara, sed ĉiam tre aktiva membro en la kampoj de instruado kaj informado. Antaŭ ol li aliĝis al FLE, unu el la asocioj antaŭaj al Esperanto Nederland, li aktivis en SAT-Junulfako. Li helpas la estraron ekzemple pri la ZUM-kunvenoj, li kunorganizas la Amsterdaman Rondon, organizas kurson ZUM-e kaj kontrolas *Fenikso*-n. La prezidanto (Marc) havas personan kialon esti danka al Bert, ĉar per libro trovita en la loka biblioteko en Den Bosch li eksciis la adreson de FEN. Marc kontaktis ĝin kaj Bert respondis, ke li verkis novan Praktikan Kurson de Esperanto, kiun Marc faris senpage estante juna, dum Bert kontrolis la taskojn. Nome de la asocio la prezidanto dankas Bert pro liaj laboroj. La prezidanto prezentis al Bert jubilean gratuldokumenton, inkluzive sakon kaj poŝtmarkojn. Bert dankis kaj la kunveno aplaŭdis.

## 11. Verloren van Themaat-premio

Willem Verloren van Themaat estis intelektulo de la movado, matematikisto, kiu laboris en la Universitato de Amsterdamo. Li estis aktiva en la movado. Li tradukis en kaj el Esperanto. Li forpasis en 1996 kaj post lia forpaso la nederlandaj esperantistoj starigis la Premion Verloren van Themaat, kiu estas premio por iu, kiu sin dediĉas en rimarkinda kaj efika maniero al la disvastigo de scio pri Esperanto en la nederlandaj amaskomunikiloj. Ekde la pasinta jaro la estraro de Esperanto Nederland estas la ĵurio kaj ĉi-jare ni havas tre klaran laŭreaton, iun, kiu jam de multaj jaroj sin dediĉas kun plena fervoro al la scio de la lingvo kaj ĝia kulturo. Parte tio estas profesia laboro, sed liaj penoj kaj klopodoj multe transpasas tion. Li estas kun ni rete: prof-o Federico Gobbo. La kunveno aplaŭdis. Ĉi-jare li estis tre videbla en la publika sfero, en amaskomunikiloj, kiel la vaste legataj gazetoj *AD* kaj *Het Parool*. Li estis intervjuita de la dekano de sia fakultato Marieke de Goede en ŝia podkasto. Super ĉio ni volas doni al li la premion pro la raportado *Verbeter de wereld, spreek Esperanto* (Plibonigu la mondon, parolu Esperanton) en *De Groene Amsterdammer* en decembro pasintjare. Tio estis tre bela kaj ekvilibra artikolo pri la volontulaj lecionoj, kiujn donas Federico, sed ankaŭ bone informas pri la historio kaj nuntempo de la movado. Tio estis certe danke al la ĵurnalisto, sed certe ankaŭ pro la maniero, en kiu Gobbo ĉiam parolas pri nia afero. Ankaŭ en ĉi tiu jaro venos nova publika evento, bela vespero en la itala kultura instituto en Amsterdamo la 16-an de majo kiun organizas Federico kun la itala ambasadoro. La itala ambasadoro en Nederlando estas esperantisto. Tio montras, ke nia profesoro de Esperanto estas tre grava por la movado tutmonde kaj ankaŭ en Nederlando kaj ne nur por siaj propraj studentoj. Ni volas danki kaj honori lin per ĉi tiu premio. Federico ne povas ĉeesti ĉar li malsanas. Ni deziras al li baldaŭan resaniĝon. Poste la prezidanto povos viziti lin kaj doni al li belan gratuldokumenton. La kunveno aplaŭdis. La dokumento diras: Esperanto Nederland asignas la premion Verloren van Themaat en la jaro 2023 al Federico Gobbo pro nelacigebla diligenteco publikigi pri Esperanto.

## 12. Ronddemandado

- Ekestis diskuto pri ebla nova Rebata Servo, kiu ankaŭ konsideru la novajn amaskomunikilojn. Ĉi tiu punkto povos esti pritraktata en nova WhatsApp-grupo, kiu celas aktivajn membrojn volantajn rebati negativajn artikolojn en amaskomunikiloj kaj fari similajn aferojn.
- Salutojn al la membroj sendis An Olijslagers kaj Rob Moerbeek
- Kiel oni povas partopreni en la estraro? Eblas ĉeesti la estrarkunvenojn, kiuj plej multe okazas rete. Ankaŭ atentu la rubrikon *De la estraro* en *Fenikso*, kiu raportas preskaŭ ĉion, kion la estraro faras.
- Kiel fari la venontan jarkunvenon pli alloga? Ĉi-jare mankis posttagmeza programo. (*La estraro decidis venontjare aranĝi prelegon aŭ ion similan post la membrokunveno.*)
- Venis sugestoj por pliaj aktivadoj: pri legindaj libroj en Esperanto, kiuj reprezentas la kulturon, pri helpo al la retejo, trejnado de aktivuloj. Iniciatantoj serĉu volontulojn, kiuj helpos realigi tiajn ideojn.
- Bert ricevis vidbendojn kaj kompaktdiskojn. Kelkajn prenis partoprenantoj en studsemajnfino. Aliaj povus iri al la arkivo en Diest kaj la bibliotekoj en Vieno kaj Varsovio.

## 13. Fermo

La prezidanto dankis la ĉeestantojn kaj fermis la kunvenon.

**Zoetermeer, la 27an de novembro 2024.**

*Rob Groeneveld,*
*sekretario.*

# Tagordo por la 34-a ĝenerala kunveno de Esperanto Nederland

okazonta la 10-an de majo 2025 – de la 13.00 h en la ejo De Kargadoor, Oudegracht 36, 3511 AP Utrecht

Membro povas reprezenti maksimume 2 aliajn membrojn, se li/ŝi/ri transdonis subskribitajn mandatojn al la registranto ĉe la komenco de la kunveno.

Agadraporto, financaj raportoj, buĝeto kaj laborplano aperos poste en la retejo. Paperajn ekzemplerojn vi povos peti de la sekretario post la 1-a de marto 2025.

**Alveno** ekde 13.00 h

**1. Malfermo** de la ĝenerala kunveno je 13.15 h.
Rememoro de la forpasintaj membroj.
Nomumi du personojn por la kalkulado de la voĉdonoj.

**2. Fikso de la tagordo**
Estas eble ŝanĝi la tagordon.

**3. Protokolo pri la 33-a ĝenerala kunveno en 2024**
(teksto aperis en *Fenikso*)

**4. Envenintaĵoj**
Sendu sugestojn por pritrakto sub ĉi tiu punkto antaŭe al la sekretario.

**5. Komunikoj**
Sub ĉi tiu punkto eblas komuniki ion al la membroj.

**6. Agadraporto pri 2024**

**7. Financa jarraporto pri 2024**
7.1. Raporto de la kaskontrol-komisiono
7.2. Rezultkonto pri 2024 kun klarigoj
7.3. Bilanco je 31-12-2024

**8. Proponoj**
8.1. Propono de la estraro: fikso de la kotizoj por 2026.
La estraro proponas plialtigi la jaran kotizon por membroj per 1,50 eŭroj al 41,50 eŭroj. La kotizoj de samhejmanoj kaj membroj ĝis 30-jaraj restos senŝanĝaj.
8.2. Buĝeto kaj Laborplano 2025 (ŝanĝita) kaj 2026
8.3. Plano por informado

**9. Elektoj**
9.1. Estraro.
La kasisto Loes Demmendaal demisias. La estraro proponas Kees Neeft kiel novan kasiston. La prezidanto Marc van Oostendorp demisias kaj estas reelektebla. Peter van Noorden demisias kaj estas reelektebla, se ne anoncas sin aliaj kandidatoj por la estraro.
Elekto de aliaj estraranoj. Kandidatoj estas serĉataj.
9.2. Kaskontrol-komisiono
La kaskontrol-komisiono por la jaro 2024 estas Mariska de Jonge kaj Ans Bakker-ten Hagen. Rezerva membro estas Peter Ebenau. Nova membro por la jaro 2025 estas serĉata.
9.3. Komitatano A ĉe UEA
Kandidato estas serĉata.
9.4. La estraro proponas ŝanĝi la *Huishoudelijk reglement* jene:
Artikel 26.4: *Het bedrag van de prijs wordt jaarlijks vastgesteld als onderdeel van de begroting.*

**10. Fenikso**

**11. Informado pri diversaj temoj**
11.1. Kultura tago
11.2. Studosemajnfinoj
11.3. Informoj pri la nova retejo de Esperanto Nederland

**12. Jubileantoj**
12.1. Ni honoras la membrojn, kiuj festas sian 50-jaran membrecon.
12.2. Ni mencias la membrojn, kiuj antaŭ 25 jaroj aliĝis al la asocio.

**13. Verloren van Themaat-premio**
La ĵurio anoncas la rezulton pri la jaro 2024.

**14. Ronddemandado.**

**15. Fermo**

*Rob Groeneveld, sekretario*
*Zoetermeer, la 25an de novembro 2024*

La ĝenerala kunveno okazos la **10-an de majo** en Utrecht.
La Kultura Tago okazos la **14-an de junio** en Alkmaar.

## Lerni kaj amuziĝi en Krikkenhaar

Kvardeko da personoj partoprenis en la aŭtuna studosemajnfino de Esperanto Nederland en Krikkenhaar de la 8-a ĝis la 10-a de novembro 2024. La instruado okazis en kvin grupoj aranĝitaj laŭnivele ekde la tutkomencantoj ĝis spertuloj. La kursojn gvidis Rob Groeneveld, Roel Haveman, Bert de Wit, Paweł Fischer-Kotowski kaj Federico Gobbo.

La partoprenantoj venis el praktike ĉiuj partoj de Nederlando, sed ankaŭ el Germanio kaj Svedio. Krom la regulaj partoprenantoj aperis ankaŭ kelkaj novaj vizaĝoj. Inter ili Rianne, kiu poste volontulis por la Domo de Mateo (ŝian raporton – en bonega Esperanto! – vi trovos sur **paĝo 16** de ĉi tiu numero de *Fenikso*), kaj Stefan, kiu venis kun sia 12-jara filino Sara.

En la studosemajnfinoj gravas ne nur la formalaj kursoj, sed ankaŭ la amuziĝo dum la manĝ- aŭ kafpaŭzoj kaj vesperoj. Ankaŭ tiam oni povas lerni ion novan pri kaj en Esperanto!

*Fotoj: Ineke Emmelkamp*






















# Junaj esperantistoj renkontiĝas en Nord-Brabanto

Esperantaj asocioj estas kiel balgo: ili rapide enspiras kaj lante elspiras. Ankaŭ en la historio de Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ) okazis plurfoje, ke la aero elĉerpiĝis kaj la asocio bezonis paŭzon. Tiel okazis antaŭ kelkaj jaroj, post kiam la estraro de NEJ estis neaktiva kaj ne organizis renkontiĝojn. Estas zorgiga situacio, sed paŭzoj ne estas eternaj. Kiel antaŭe, Nederlando loĝigas multajn junajn esperantistojn, kiuj renkontiĝus se ili povus. Tion montris ankaŭ la renkontiĝo en Nord-Brabanto, kiu okazis en oktobro.



*Moderna, aŭtomata teksilo, kiun oni povas programi per komputilo (Foto: Giulio Dioguardi)*

Dum la pasintaj jaroj amikoj plurfoje demandis min, ĉu eblus organizi spontanean renkontiĝon. Estis bona ideo, sed facile antaŭenŝovebla. Antaŭ nelonge mi ricevis la saman demandon de amiko el Nov-Zelando, kiu restas en Nederlando dum nur kelkaj monatoj, kaj mi ne plu povis prokrasti. Mi rapide organizis renkontiĝon en mia studenta domo en Eindhoven kaj invitis miajn amikojn. Kvankam ni finfine renkontiĝis sesope, estis sufiĉe da homoj kiuj jam havis plenajn agendojn kaj promesis veni la sekvan fojon.

La renkontiĝo estis simpla, sed amuza. Ni komencis per tagmanĝo, kiu konsistis el rizo kaj legomoj, pakitaj en rizpapero (*Bánh tráng*). Estis tre taŭga manĝo por renkontiĝo, ĉar ĉiu povis laŭguste plenigi sian propran rizpaperaĵon. Poste ni trinkis teon kaj ludis. Surprize, la ludo *PimPamPet* estas tre populara inter esperantistoj. Laste, ni vojaĝis al la apuda urbo Geldrop, kie ni vizitis la Teksomuzeon (*Weverijmuseum*). Estis nur mallonga vojaĝo per aŭto, kaj kvankam mi loĝas en la regiono dum mia tuta vivo, mi neniam antaŭe vizitis ĝin.


Teksado ĉiam ludis gravan rolon en la historio de Geldrop, kiu rapide industriiĝis en la 19-a jarcento. La Teksomuzeo troviĝas en konstruaĵo de fabriko el tiu tempo kaj prezentas sennombrajn funkciantajn teksilojn el malsamaj epokoj. Estis interese vidi kiel la maŝinoj evoluis de simplaj teksiloj al kompleksaj teksiloj kun trukartoj kaj finfine aŭtomate programeblaj teksiloj per komputiloj. La tutan historion rakontis afabla volontulo de la muzeo, kiu tre paciencis pri la interpretado por nia internacia gasto. La Teksomuzeo estas bela loko kun bonegaj volontuloj, kiujn mi forte rekomendas.

Mi parolas nome de ĉiuj partoprenantoj, dirante ke la renkontiĝo estis sukceso. Homoj restis eĉ post la fino por kune manĝi picon! Pli grava, tamen, estas la mesaĝo, ke la membroj de NEJ deziras pli da aktivado ol ĉi-momente okazas. Eĉ se la asocio nun ne pretas por organizi plurtagan, internacian eventon, la barilo por ĉi tia (aŭ reta) renkontiĝo estas multe malpli alta kaj Nederlando plenas je junaj esperantistoj kiuj volas veni. Al la junuloj legantaj ĉi tiun artikolon mi demandu do… ĉu sekvafoje ĉe vi?

*Frank van Hertrooij*



*Jacquard-teksilo kreanta kompleksan desegnaĵon per trukartoj (Foto: Giulio Dioguardi)*



*Tukoj teksitaj en la muzeo (Fotoj: Giulio Dioguardi)*



# Ĉeĥa surprizo kaj malkovro en Amsterdamo

Sabaton la 19-an de oktobro, mi iris kun amiko al la *Matinee*, prezento en la posttagmezo en la amsterdama koncertejo. Ĝi estas organizata de NTR kaj oni rekte elsendas la muzikan prezenton en la radio (*NPO Radio Klassiek*, antaŭe *Radio 4*). Mi jam ofte iris al tia posttagmeza prezento, ĉar la muzikistoj kaj la solkantistoj estas ofte mondfamaj kaj bonegaj. Mi abonis la serion de malnova muziko kun operoj.

Nu, en la 19-a de oktobro, iu por mi tute nekonata komponisto estis en la programo. Temis pri Josef Mysliveček, ĉeĥa komponisto el la 18-a jarcento. Li multe laboris en Italio, lando de la opero, kaj estis tre bone konata kaj laŭdata tie kiel "dia bohemiano". Ĉar li venis el Bohemio kaj de 1760 ĝis 1780 li estis la plej amata kaj plej bone pagata operkomponisto de Italio. Mozart laŭdire multe ŝuldas al li. Aŭskultante la muzikon, oni bone komprenas tiun eldiron, ĉar vere, lia muziko multe similas tiun de Mozart.

Sen iu antaŭjuĝo mi aŭskultis la muzikon kaj la operajn voĉojn. Belege! Kaj kiom teknike malfacilaj estas kelkaj el la arioj el la oratorio *Abrahamo kaj Isaako*, kiun ni aŭskultas en la koncertejo en Amsterdamo! Temas pri la ordono de Dio, ke Abrahamo oferu sian propran filon Isaako.

Baldaŭ la publiko ekaplaŭdas post teknike malfacilaj arioj, kiujn la solkantistoj kvazaŭ leĝere kantas. Mi rimarkas ke la tenoro Michele Angelini (usondevena) nekredeble bele kantas, tiel ke ekstaras la haroj sur mia tremanta dorso. Kaj tiam mi ekmemoras, ke mi jam foje aŭdis lin en la *Matinee*-prezento en februaro 2020, antaŭ la eko de la pandemiaj striktaj limigoj. Tiam temis pri la opero *Semiramide* de Rossini. Nekredeble bela voĉo kaj teknike perfekta. (Vi povas mem aŭskulti lian voĉon en la interreto: **https://www.micheleangelini.com/listen**).

Sed ankaŭ la aliaj kantistoj – Kateryna Kasper, Paula Murrihy, Eleonora Bellocci kaj Matthias Winckhler – bonege kantis, tiel ke fine la aplaŭdo daŭris pli ol 5 minutojn.

La orkestro estis ĉeĥa, Collegium Vocale 1704. Sed ne erare pensu, ke ĝi fondiĝis en 1704, ĉar tio okazis fakte en 2006. La dirigento Václav Luks precize indikis la partojn, kie la diversaj muzikistoj devis akcenti sian prezenton kaj li mute kunkantis kun la solkantistoj…




*Portreto de Josef Mysliveček (1737-1781)*

Post la surpriza ekkonatiĝo kun la verko de la dia bohemiano ni iris ion manĝi en apuda itala restoracio. Sed: dua surprizo, kiam ni jam manĝis nian picon: venas la dirigento en la saman restoracion kaj eksidas ĉe apuda tablo. Mia amiko ne povas ne komenci babiladon pri la prezento. Montriĝas ke ĉi tie, en Amsterdamo, estis la tria prezento de la oratorio post prezentoj en Prago kaj Dresdeno. La dirigento akcentis ke la arioj estas ofte tre malfacilaj kaj postulas grandan suplecon de la voĉo. Nu, tion feliĉe la solkantistoj havis. Ni dum duona horo babilis pri la komponisto, pri kies vivo oni faris filmon (*Il Boemo*, 2023), pri populismaj figuroj en Nederlando kaj Ĉeĥio, kiuj minacas kulturpolitikon, kaj pri la planoj, kiujn la dirigento havas. Mi ankaŭ sciigis al li, ke en la praga koncertejo oni antaŭnelonge prezentis operon en Esperanto (temas pri la opero *Sternenhoch* verkita de Ivan Archer). Unue ni interparolis en la angla, sed la amiko tiom malŝatis, ke la servistino argentina tute ne – eĉ ne unu vorton – parolis nederlande, ke ni transiris al la germana lingvo. Montriĝis neniu problemo. Ni kore adiaŭis unu la alian kiam ni finmanĝintis kaj kaftrinkis.

Do, duobla ĉeĥa surprizo kaj kia malkovro en tiu oktobra tago en Amsterdamo!

*Bert de Wit*

## Inspirotago en Maastricht

En oktobro 2024 prof. Federico Gobbo prezentis Esperanton en la aplika universitato Zuyd en Maastricht. Kadre de *Inspiratiedag* la duhoran prelegon de prof. Gobbo ĉeestis kvardeko da studentoj de la unua kaj dua studojaroj. La ĉefa celo de Zuyd estas eduki novajn tradukistojn kaj interpretistojn. La inviton peris Universala Esperanto-Asocio.

La studentoj ricevis la ĉefajn ŝlosilojn por ekkompreni la Esperantan gramatikon – kaj tio rekte en la internacia lingvo mem. Krome, estis mallonge prezentitaj la historio de Esperanto kaj la vivo de L.L. Zamenhof. Por montri la vivantecon de la lingvo aperis kelkaj ekzemploj de tabuaj vortoj (oni ja povas esprimi en Esperanto ĉion!) kaj menciiĝis la uzo de Esperanto en Vikipedio, Google Tradukilo kaj ChatGPT.

En la dua horo la studentoj ricevis malgrandan tradukekzercon – ili devis angligi artikolon el *Monato*. Kvankam la tempo sufiĉis nur por la titolo kaj kelkaj enkondukaj frazoj, la partoprenantoj estis impresitaj de la fakto, ke ili sukcesis pri la tasko, kvankam ne temis pri iu simpligita teksto por edukaj celoj, sed vera artikolo el gazeto.

En la fino restis tempo por demandoj, kaj kiam la ateliero finiĝis, la tuta grupo buse ekskursis al la trilanda punkto, kie iam estis ankaŭ la limo de Neŭtrala Moresnet.



*Surbaze de la raporto de prof. Federico Gobbo por la revuo Esperanto (decembro 2024). Foto el* Esperanto.

## Esperanto en la urba muzeo

Ĝis la 23-a de marto 2025 la *Stedelijk Museum* en Amsterdam prezentas la ekspozicion *Circulate*, kadre de kiu oni povas rigardi fotojn de 21 artistoj elektitaj pro la speciala, noviga maniero en kiu ili aliras la fotoarton. Multaj el la verkoj estas kreitaj speciale por ĉi tiu ekspozicio. Unu el la artistoj, Ana María Gómez López, faris el Esperanto la ĉeflingvon de sia artaĵo. “Kaj la lingvo Esperanto estas, kiel parto de tiu artaĵo, bele elmontrita en ĉi tiu sufiĉe grava muzeo”, raportas Ralph Schmeits, kiu kune kun Rob Moerbeek ĉeestis la malfermon de la ekspozicio.

Pli da informoj pri:
- la ekspozicio: https://mallonge.net/1ju
- la projekto mem: https://mallonge.net/1jv
- la artistino: https://mallonge.net/1jw

## UK kaj IJK prokrastitaj

UEA informis pri la ŝanĝo de la datoj de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto. Ĝi okazos unu semajnon poste: de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 2025 en Brno, Ĉeĥio. Tio estas la unua fojo en la historio, ke oni ŝanĝas la datojn de la kongreso. Antaŭe la kongreso estis jam tri fojojn nuligita (pro la komenco de la unua mondmilito en 1914 kaj pro la epidemio en 2020 kaj 2021) kaj unu fojon oni ŝanĝis la kongreslandon (pro la streĉa situacio en Israelo la kongreso estis movita al Nederlando en 1967).

Ĝis la fino de 2024 al la 110-a UK aliĝis 679 personoj el 53 landoj, inter ili 20 personoj el Nederlando. La nuna (2-a) aliĝperiodo daŭras ĝis la 31-a de marto 2025, poste la kotizoj plialtiĝos. Pli da informoj: http://uea.org/kongresoj

Post la decido de UEA, ankaŭ TEJO prokrastis sian kongreson. La 81-a Internacia Junulara Kongreso okazos de la 9-a ĝis la 16-a de aŭgusto 2025 en Cisuara (Bogor), Indonezio. Pli da informoj: http://ijk.tejo.org







## Piet Schuil (1942–2024)


La 19-an de novembro 2024 forpasis Piet Schuil, la partnero de Atie van Zeist. Profesie Piet estis kargisto (*cargadoor*), sed li iĝis bonega uzanto de nia lingvo kaj funkciis en la komencaj 1990-aj jaroj kiel sekretario kaj ekde 1995 kiel prezidanto de la Roterdama Esperanto-Societo “Merkurio”. La gvidadon de la klubo li kun Atie kiel sekretario longe daŭrigis, ĝis la membraro tro malmultiĝis. Memorindaj estas la belaj sankta-nikolaaj surprizoj kiujn (diveneble) li sukcesis konstrui.

Sed li plenumis ankaŭ la rolon de delegito de UEA por Roterdamo, kun Atie van Zeist kiel vicdelegito. Kaj li funkciis krome por Institucio Hodler. Naŭfoje li partoprenis Universalajn Kongresojn de Esperanto, ekde 1995 ĝis 2015.

Ni perdis tre afablan kaj inspiran aktivulon, kiu bedaŭrinde en la lastaj jaroj suferis gravan malsanon, tamen restante klarmensa ĝisfine. Ni kore kondolencas Atie kaj la familion.

*Rob Moerbeek kun helpo de Peter den Breems kaj Atie van Zeist*

## Kees Bos (1940–2024)



La 10-an de novembro 2024 forpasis Cornelis Adriaan (Kees) Bos, konsilisto kaj universitata docento pri urboplanado. Esperantistiĝis en 1986, sekvis la kurson de Rob Moerbeek en la Universitato de Amsterdamo. Dum la tuta vivo li aktivis por la koncepto de loĝeblaj urboj, ekde la 1970-aj jaroj partoprenis en diversaj loĝanto-grupoj en Utrecht, kiuj okupiĝis pri tiu temo. Ĉeestis plurajn Universalajn Kongresojn (i.a. Roterdamo, Prago, Berlino, Vilno). Membris en Utreĥta Esperantista Rondo kaj regiona klubo Utrecht. Interesiĝis pri literaturo kaj tradukado.

Kiel estrarano de Internacia Esperanto-Instituto Kees Bos zorgis pri la renovigo de la Cseh-domo ĉe Riouwstraat 172 en Hago. Pro tio li estis en 2007 nomita Honora Kunlaboranto de IEI.



## Ad Peeraer (1936–2024)

La 15-an de decembro 2024 forpasis Ad Peeraer, lojala membro de la Alkmara Esperanto-klubo ekde 2002. Li lernis Esperanton jam dum siaj mezlernejaj jaroj kaj helpis plurajn homojn lerni ĝin. Li tre zorge uzis la lingvon.

Ad aktive kontribuis dum niaj klubvesperoj, li ĉiam havis propran rakonton pri la priparolata temo. Tre ofte pri historio, sed ankaŭ koncerne la naturon. Kiel pasia instruisto de biologio, aparte la lasta temo estis por li tre interesa.

Kiam kun nia klubo ni vizitis la partnerajn urbojn de Alkmaar, ankaŭ li ĉeestis kaj iniciatis multajn konversaciojn. Ni sopiros lin kaj daŭre memoros pri li!

*Tiny Droge, prezidanto de la Alkmara Esperanto-klubo*

Internacie

# Volontulado en la Domo de Mateo

En la Beneluksa Kongreso en Hasselt, en septembro 2024, mi ekparolis kun Alex Humet, kiu tiel entuziasme rakontis pri sia projekto *Domo de Mateo*, ke mi proponis volontuli dum kelkaj semajnoj kaj helpi en la pretigado de la loko.



Post la forpaso de sia filo pro grava depresio en 2018, Alex decidis komenci projekton kiu povus helpi homojn en simila situacio kiel tiu de Matthias – per kunvivado, kunlaborado, kunpromenado ktp. Pro iu hazardo li povis aĉeti en Corbion duan domon, kiu estis forlasita pro jura procezo, sentegmenta, kun multe da kreskaĵoj en ĝi kaj tute malseka… Tiam naskiĝis la projekto: Domo de Mateo, kune kun ĝia devizo: "Vojiranto: ne estas vojo. Dum vi iros ĝi ekestos, en trankvilo kaj paco." Tio signifas, ke oni kune laboras por la domo, kaj ke la projekto kreiĝas kaj formiĝas dum la laborado kaj kunvivado.



Ankaŭ mia koramiko Ronald opiniis, ke estus interese partopreni, kaj li povis liberigi tempon, do ni kune vojaĝis al la trankvila vilaĝo Corbion, kiu situas en tre bela regiono sude en Belgio.

Mi ne tre bone sciis, kiujn laborojn ni plenumos, sed mi ja sciis ke ni helpos pretigi la domon. Ĝi jam havas novan tegmenton kaj kiam ni venis, ĝi estis plena de diversaj laboriloj kaj aliaj aferoj, do la plej grava tasko, kiun ni faris, estis helpi ordigi ĝin. Ni ankaŭ purigis ĝin kaj segis lignon por la forno. Krom tio mi zorgis pri kuirado kaj ni manĝis kune en familia etoso.

Estis kontentige, ke ni povis esti utilaj por la daŭrigo de la projekto. Estis agrable fari aferojn kune, kiel kunludi, vojaĝi al Luksemburgo por renkontiĝo kun aliaj esperantistoj, traduki hajkojn al Esperanto, viziti la belan urbeton Bouillon kaj la proksiman monaĥinejon Cordemois aŭ spekti rete la Esperantan teatraĵon *1910*. Por mi estis tre valora sperto praktiki mian Esperanton en tiuj ĉiutagaj situacioj.



Al tiuj, kiuj volas dum kelka tempo esti iom for de sia medio, la Domo de Mateo povas efektive helpi. Vi povas fari mirindajn promenadojn, kaj tio estas tute alia sperto. Mi esperas, ke la projekto sukcesos kaj mi volonte plu sekvos ĝian evoluon.

*Rianne Sanders*



## Dokumentfilmo pri esperantista petveturado

Gabin Forcier, franca esperantisto kiu partoprenis en la studsemajnfino en 2022, faris dokumentfilmon pri sia petvetura vojaĝo tra Eŭropo pere de Esperanto. En la filmo li ĉeestas plurajn Esperantajn kunvenojn kaj intervjuas esperantistojn kiujn li renkontas. Dum la vojaĝo li tendumas kaj gastas ĉe homoj per *Pasporta Servo*. Li rakontas ankaŭ pri la vizito en Roterdamo, kie li gastis en la Volontula Domo.


La filmo *Esperante Eŭropen. Mia vojaĝo al la malkovro de Esperanto* estas spektebla en YouTube ( **https://mallonge.net/1j8** ). La filmeto estas subtitolita kaj la subtitoloj estas tradukitaj en dekon da lingvoj, ankaŭ en la nederlandan.



*Gabin survoje. Fonto: YouTube*

## Claude Gacond

La konata svisa esperantisto Claude Gacond, honora membro de UEA kaj fondinto de Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI) en La Chaux-de-Fonds forpasis la 17-an de novembro 2024. Profesie instruisto, en la Esperanto-movado li prizorgis unu el la plej grandaj kaj gravaj bibliotekoj kaj arkivoj – CDELI, nun parto de la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds en la kantono Neuchâtel (Svislando). Kun sia edzino Andrée, li prizorgis la Esperanto-elsendojn de Svisa Radio Internacia (1962–1992).



*Fonto: La Ondo de Esperanto*

## István Nemere

La 15-an de novembro 2024 forpasis István Nemere, unu el la plej fekundaj aŭtoroj ne nur Esperanto, sed ĝenerale – li verkis 800 librojn, el kiuj 22 originale en Esperanto. Ankoraŭ kelkajn tagojn antaŭ la morto li festis la 80-an naskiĝdatrevenon, sed pro la perdo de la konscio dum la aŭtostirado li trafiĝis en hospitalon, kie li restis ĝis la morto sub profunda anestezo. Inter liaj Esperantaj romanoj estas ekzemple *La fermita urbo* (lia debutromano en Esperanto, 1982), *La blinda birdo* kaj *Jesa*.



*Fonto: Wikimedia Commons (Vadas Róbert)*

## Stela Besenyei-Merger duoble premiita



La 15-an de decembro 2024 la redakcio de *La Ondo de Esperanto* anoncis la nomon de la Esperantisto de la Jaro 2024. Ĉi tiun honoran titolon la elekta komisiono aljuĝis al Stela (Eszter) Besenyei-Merger, 37-jara denaska esperantistino el Hungario, kiu en 2021 iniciatis la literaturan projekton Bobelarto. Ŝi kuraĝigas homojn legi Esperanto-literaturon kaj ankaŭ verki en Esperanto, ekzemple kadre de MoVeMo (Monda Verk-Monato) aŭ INK (Internacia Novel-Konkurso), en kiu ŝi estas sekretario. *La Ondo de Esperanto* anoncis, ke ĉi tiu estis la lasta eldono de la konkurso, kiu komenciĝis en 1998. Inter la laŭreatoj de la titolo La Esperantisto de la Jaro estas i.a. William Auld, Osmo Buller, Katalin Kováts kaj Anna Löwenstein.

Du semajnojn post la publikigo de la nomo de la Esperantisto de la Jaro 2024, UEA anoncis, ke la sama Stela Besenyei-Merger ricevas ankaŭ la Premion Grégoire Maertens. Temas pri nova premio, starigita honore al la eksa prezidanto de UEA (1980–1986) Grégoire Maertens, kiu 100-jariĝis en 2024. La premiito ricevas 1000 eŭrojn.

Por legi pri Bobelarto kaj partopreni en ĝiaj aktivaĵoj bv. viziti la retejon
**https://bobelarto.ink/**

**Fenikso rekomendas**

## Usone Persone (podkasto)

Tri esperantistoj el Usono – Hans Becklin, Rafa Nogueras kaj Brandon Sowers – regule renkontiĝas por priparoli diversajn aspektojn de niaj kulturo kaj movado. Kvankam la podkasto estas registrata dum reta kunsido, oni preskaŭ sentas, ke oni sidas kun la triopo ĉe la sama tablo por sekvi viglan interŝanĝon de opinioj. Ne mankas ŝercoj, sed enestas ankaŭ kleriga elemento, dank' al kiu la aŭskultanto povas plibonigi siajn lingvouzon kaj sciojn pri la movado.




La temaro estas vasta, sed koncentriĝas ĉefe pri la Esperanta kulturo, kun aparta atento al la literaturo – la podkastistoj ankaŭ mem verkas kaj tradukas. Bela kaj altkvalita lingvouzo, interesvekaj opinioj, konataj gastoj kaj pinĉpreno da humuro kreas bonan recepton por kateni vin por ĉirkaŭ 1,5-hora epizodo. Feliĉe ĉar temas pri podkasto, vi povas aŭskulti ĝin ankaŭ dum promeno aŭ hejmlaboroj.

La podkasto *Usone Persone* aperis en aŭgusto 2022 kaj ĝis nun lanĉiĝis 32 epizodoj, kiujn indas (re)aŭskultis, ĉar ili ne perdis sian aktualecon.

**Aŭskultu en Spotify: https://mallonge.net/1k0**

*Paweł Fischer-Kotowski*





## Jen mi!

| | |
|---|---|
| **Nomo:** | Maike Bouma |
| **Aĝo:** | 58 |
| **Loĝloko:** | Idsegahuizum (Frislando), frise: Skuzum |
| **Profesio:** | agrikulturisto |


*Boukje 99 kun mi.*

Same kiel miaj gepatroj, mi estas agrikulturisto. Mi laboras en la sama bieno, en kiu mi naskiĝis. Temas pri ekologia bieno. Mia familio estis pionira en tiu kampo, ĉar en *Skal*, kiu okupiĝas pri la kontrolado de ekologia artikulturo en la tuta lando, ni estas registritaj jam pli ol 40 jarojn sub n-ro 26. Nia bieno troviĝas en la frisa vilaĝo Skuzum. Mi uzas la frisan lingvon ĉiutage, kun la familio kaj kun miaj kontraktistoj, sed kun mia partnero Frank mi parolas en la nederlanda, ĉar li venas el Norda Brabanto.

La bieno estas 55-hektara, el tio plejparto estas nur torfmarĉo. Ni havas 60 bovinojn, el kiuj ĉirkaŭ triono estas el la raso frisa-ruĝa ( **www.roodbontfriesvee.nl**). En la tuta mondo estas nun nur ĉ. 700 bovinoj el tiu raso. Ni bredas virbovojn kaj kunlaboras pri tio kun gen-banko. Krome ni havas bovinojn el la rasoj frisa-nigra (alia triono) kaj la lasta triono estas el miksitaj rasoj.

Nia bieno estas ekologia kaj tio signifas, ke ni ne uzas artefaritan sterkaĵon aŭ kemiaĵojn kontraŭ nedezirata vivo. La celo ne estas produkti kiel eble plej multe, sed produkti lakton en bona bilanco, konsiderante ankaŭ la bonon de la bovinoj, plantoj, tervivo kaj la naturo ĝenerale. Bedaŭrinde, la registaraj reguloj multe pli favoras la intensan grandproduktadon, sed pro la principoj ni restas ekologiaj kaj zorgas pri la bio-diverseco. Pri la pluvendado de nia lakto zorgas laktaĵkooperativo. Alia flanko de nia aktivado estas produktado de la ventenergio per la ventoturbinoj en nia bieno.

Ĉar la bovinoj ne komprenas kio estas semajnfino kaj ili bezonas manĝi ĉiutage, mi laboras sep tagojn en semajno. Mi kutime ellitiĝas inter la 6h30 kaj 7h00. La bovinoj ricevas la unuan manĝon de la tago, okazas melkado kaj purigado de ilia dormloko. Poste ni donas lakton kaj manĝon al la bovidoj, katoj, kokinoj kaj hundo. Tiam venas la tempo por nia propra matenmanĝo. Mi ankaŭ legas gazeton, faras domlaboron, iom ekzercas kaj kafpaŭzas. Sekvas la prizorgado de paperaĵoj, pagoj kaj korespondado, kio estas nemalgrava parto de nia laboro. La plenigo de la ĉiujara raporto prenas ĉirkaŭ tri tagojn, ĝi estas tre detala kaj se oni ne plenigas ĝin ĝuste, oni riskas altan monpunon.

Post la lunĉo ni denove nutras la bovinojn kaj bovidojn. Kiam multe pluvas, estas tre grave kontroli la akvonivelojn kaj mastrumi la akvon, kiam ĝi tro multas en la kampo. Post la posttagmeza paŭzo, en kiu ni kutime trinkas teon, ni denove melkas la bovinojn, purigas iliajn kuŝlokojn kaj nutras ĉiujn bestojn. La vespero estas tempo por iom da ripozo, sed antaŭ la noktomezo ni denove laboras dum unu horo – tiam okazas la lasta nutrado de la tago kaj ankaŭ iom da ordigado. Mi enlitiĝas ĉirkaŭ la noktomezo.

Mi tre ŝatas mian laboron, sed pro la aĝo mi serĉas posteulon.


*Esperanto-flago sur la piedo de ventoturbino.*



*Benata Hengstmengel-Koopmans*
benata@zonnet.nl

**Revuo-interŝanĝo estas projekto por prezenti enhavon de aliaj revuoj.**

## Norvega Esperantisto

***numero 3/2024, 100a jaro (!)***

Tre leginda revuo kun diversaj leteroj kaj reagoj de legantoj. Enhavas interalie raporton pri la 35-aj Esperanto-Tagoj de Krakovo (31.05. – 02.06.2024). Mencias 'Aminda Radio Esperanto' el Malagasio. Skribas pri baleno Valdimir, ne Vladimir! Cetere aperas nordnorvega historia artikolo pri Ottar el Hålogaland, kiu unue sciigis la nomon de sia lando: Norvegio!

## Informacije (Slovena Bulteno),

***numero 3, septembro 2024, jaro 29***

Ĉi tiun revuon sendis Rob Moerbeek pere de Ineke Emmelkamp al mi. Ĝi estas grandparte en la slovena lingvo. Ĉe diversaj fotoj (i.a. kun la titolo 'Feria infanvartado kun Esperanto') mi rekonis mian amikinon el infanaj kongresetoj en la 60-aj jaroj Nika Tavčar (nun Nika Rožej), kiun mi denove renkontis dum la UK en Torino en 2023.

## Kontakto

***numero 320, 2024-4.***

Artikolo de Frank van Hertrooij: 'La kosmo kaj ni, kiel konstelacioj kaj kulturo interplektiĝas'. Mencio pri la junulara programo dum la UK en Aruŝo, kie la plej multaj aliĝintoj (el 854) estis junuloj! La Junulara Esperanto-Semajno (JES) estos organizita de la Verdaj Skoltoj en Belgio (27.12.2024 – 02.01.2025).

## La KancerKliniko

***numero 189, januaro/februaro/marto 2024***

Sur la kovrilpaĝo bela flora bildo de Jacques Le Puil pri la Eiffel-turo, kun subskribo: Jen la printempo! Enhavas anoncon pri la 110-a UK en Brno, Ĉeĥio, 19-26 julio 2025. Ĝi okazos en la urba universitato Mendelu por estontaj agrikulturistoj, ĝardenistoj, ekologoj ktp.

## Monato

***2024-11***

Intervjuo de Massimo Ripani kun Plangshak Musa Sudri pri 'Petroloriĉo kiu ne alportis prosperon en Niĝerio'. Artikolo de Kees Neeft pri la 'Nederlanda politiko kiu iras ankoraŭ pli dekstren' post la falo de la kabineto en 2023. Roberto Pigro, la redaktoro de la lingva rubriko, verkis 'Vojaĝu tra vortoj kaj kulturoj'.

## Sennaciulo

***numeroj 04-06 (1426-1428), aprilo-majo-junio 2024***

Kun kovrilpaĝaj bildoj kaj komunikoj pri la SAT-kongreso en Porto/Oporto (Portugalio, 05–11.08.2024). Anonco pri la 98-a SAT-kongreso en Svitavy (Ĉeĥio, 12–19.07.2025).

## Sennacieca Revuo


***numeroj 151-152, 2023-2024 (aldono al Sennaciulo numeroj 1426-1428)***

La duobla numero (103 paĝoj) enhavas multajn (tradukitajn) artikolojn, i.a. la artikolon de Paul de Beer en la traduko de Rob Moerbeek kaj resumojn de prelegoj de la du lastaj SAT-kongresoj en Greziljono kaj Oporto.

## La Revuo Orienta

***numeroj 7 (= 1221), julio 2024 kaj 8-9 (=1222), aŭgusto-septembro 2024, 105a jaro.***

Sur la kovrilpaĝoj de la numeroj 7 kaj 8/9: 'Kiel ni venis, kiel ni iros kun Esperanto?'. Pri genezo de la japana movado kaj de la domo en Waseda. Sur la malantaŭaj paĝoj de la numeroj 7 kaj 8/9: diversaj fotoj de Esperanto-renkontiĝoj kaj de elirantaj estraranoj de JEI.



## Dia Regno

***numero 4 (=967) – 2024***

Teksto de la prediko de pastorino Miora Raveloharison en la Katedralo de Sankta Tereza dum la UK en Aruŝo, 04.08.2024. Gerrit Isai Berveling verkis: 'Enkonduko al ….' por akompani lian tradukon de la 'Apostolaj Patroj', kiu baldaŭ aperos kiel memstara libreto.





# Kiel rapide moviĝas elektrono tra kupra drato?

*Nur por legantoj, kiuj ŝatas defion!*

## Eksperimento

Joĉjo (16), Pedro (14) kaj ilia patrino vespermanĝis. Mallumiĝis, do Panjo demandis:

– Pedro, bonvolu enŝalti la lampon. Mi apenaŭ vidas kion mi enbuŝigas.

Pedro enŝaltis la lumon. La kuirejo tuj lumiĝis.

– Vidu, kiel rapide la elektronoj iras. Pli rapide ol raketo, certe!

Joĉjo, konsideranta sian pli junan fraton foje neelteneble pedanta, kapskuis firme.

– Eĉ malsana heliko facile devancus elektronon.

– Ne babilaĉu, bubo. Vidu: la lumo aperas tuj!

– Mi ne estas bubo. Aŭskultu, rapidas la *signalo*, ne la *elektronoj*. La elektronoj…

– … respondecas pri la signalo.

– Lasu min fini la frazon. Ili…

– La porkoj trene paŝas, tamen la paŝtisto ne plendas, ĉar la bruto flugas.

– Mi ne ĵetu miajn perlojn antaŭ tiun porkon.

Panjo, antaŭvidante kverelon, ĉesigis la diskuton. Finmanĝinte, Joĉjo iris al sia ĉambro. Li konvinkos Pedron, kiu fojon post fojo bubumas kun li. Ŝlosinte la pordon, li prenis paperon, krajonon kaj kalkulilon.

## Kalkulado

Por kalkuli tiun rapidecon, Joĉjo bezonas la informojn pri la elektra potenco de la lampo kaj la dikeco de la drato. Tra larĝa strato la homamaso pli facile fluas, ĉu ne?

Ni uzu lampon de 100 vatoj kaj kuprajn dratojn kun sekca areo de 1,5 mm². En hejmoj oni uzas tension de 230 voltoj, do la kurento estu 100 / 230 = 0,43 ampero. Ĉiu elektrono havas etan ŝarĝon: $1{,}6 \cdot 10^{-19}$ C. Kune la elektronoj transportas la tutan ŝarĝon.

Unu cm³ da kupro pezas 8,96 g. Ĉiu kuproatomo kontribuas po unu liberan elektronon. La atomoj pezas po $1{,}06 \cdot 10^{-22}$ g. En ĉiu cm³ troviĝas do $8{,}96 / (1{,}06 \cdot 10^{-22}) = 8{,}45 \cdot 10^{22}$ atomoj. Kaj liberaj elektronoj.

Do: kurento, **I** = 0,43 A; sekca areo, **A** = 1,5 mm² = 0,015 cm²; kaj n= $8{,}45 \cdot 10^{22}$ *liberaj* elektronoj (kun ŝarĝo, **e** = $1{,}6 \cdot 10^{-19}$ C) en 1 cm³.

### Scienca notacio

(Mal)grandaj nombroj ne facile legeblas. Vidu 0,000000047 kaj 5110000000000.

Por faciligi la legadon, movu la komon post la unua cifero, kiu ne estas nulo.

Aldonu $\cdot 10^{-x}$ aŭ $\cdot 10^{x}$ se vi movis la komon x poziciojn dekstren aŭ maldekstren.

Rezulto $4{,}7 \cdot 10^{-8}$ kaj $5{,}11 \cdot 10^{12}$


La liberaj elektronoj *en la drato*, baze de elektro (1) kaj baze de mekaniko (2):

(1) Ju pli da kurento kaj ju pli longe ĝi fluas, des pli granda la transportita ŝargo, la nombro de liberaj elektronoj oble la ŝargo de unu elektrono: $Q = I \cdot t = N \cdot e \rightarrow \mathbf{N = I \cdot t / e}$

(2) La nombro de liberaj elektronoj en la drato egalas tiun nombron en 1 cm³ oble la drata volumeno (sekca areo oble la longo): $N = n \cdot A \cdot L$. La rapidon: dividu la distancon per la tempo: $R = L / t \rightarrow \mathbf{N = n \cdot A \cdot R \cdot t}$

**Kombino** de (1) kaj (2): $\mathbf{R = I / (n \cdot A \cdot e)}$ $R = 0{,}43 / (8{,}45 \cdot 10^{22} \cdot 0{,}015 \cdot 1{,}6 \cdot 10^{-19}) = 0{,}0021$ cm/s = 7,6 cm/h.

## Konkludo




Heliko, eĉ malsana, facile devancus elektron. Joĉjo eksplikas, ke kiam oni blovetas ĉe unu fino de ĝardena hoso, la akvo tuj eliras ĉe la alia, kvankam ĉiu akvero moviĝas tre malrapide. Pedro ankoraŭ ne kutimiĝis al tiu stranga ideo. Kaj vi?

*Harm Voortman*

### Mezurunuoj

| | |
|---|---|
| n | liberaj elektronoj en 1 cm³ |
| N | liberaj elektronoj en la drato |
| I | kurento en amperoj (A) |
| Q | ŝarĝo en kulomboj (C) |
| t | tempo en sekundoj (s) |
| A | areo (cm²) |
| L | longeco (cm) |
| R | rapideco (cm/s) |

Bij onderstaande puzzel is het de bedoeling om de gegeven woorden te vertalen naar het Nederlands. De cijfers geven het aantal letters aan van het **Nederlandse** woord. Plaats de woorden op de juiste plaats in het diagram.




**Solvo:**

| *1 | *2 | *3 | | *4 | *5 | | *6 | *7 | *8 | *9 | *10 | *11 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | | | | | | | | | | |

## 3 literoj:

| | |
|---|---|
| aj | - a |
| unu | - e |
| greftaĵo | - e |
| ankaŭ | - o |
| virhundo | - r |
| fermita | - t |
| vulpo | - v |

## 4 literoj:

| | |
|---|---|
| azeno | - e |
| manuskripto | - k |
| ekspozicio | - s |
| glaciaĵo | - ij |

## 5 literoj:

| | |
|---|---|
| vipuro | - a |
| adreso | - a |
| plurcela | - b |
| kamioneto | - c |
| forumo | - f |
| kvereloj | - h |
| lasero | - l |
| maljunulo | - o |
| rentumo | - r |
| frua | - v |
| nu | - w |

## 6 literoj:

| | |
|---|---|
| daŭre | - a |
| Vertebra | |
| ŝvelaĵo | - h |
| ja | - i |
| recepto | - r |
| kalumnio | - r |
| spaco | - r |
| kameno | - s |
| stangoj | - |

## 8 literoj:

| | |
|---|---|
| postsekve | - a |
| motivo | - d |
| gazetara foto | - p |
| reta rakonto | |
| pri vojaĝo | - r |
| Menuo por | |
| semajno | - w |

La solvo de la vortserĉenigmo en la antaŭa numero de *Fenikso* (n-ro 6/2024) estas: **"Disvastigu Esperanton"**.

La ludo estas kreita de Det Koning. Sendu vian solvon al
redakcio@esperanto-nederland.nl







*Kastelo Grésillon. Fonto: Wikimedia Commons*

## Grésillon invitas

La franca esperantista kastelo Greziljono invitas al siaj kursoj en 2025:

2025-apr-18/27: PRINTEMPAS, intensivaj kursoj por ekzamenoj kun 4 famaj instruistoj: gresillon.org/p
2025-jun-30/jul-10: Maratona Esperanto-kurso kun 3 instruistoj, ankaŭ por blinduloj, kun Internacia E-Konferenco: gresillon.org/m
2025-aŭg-24/29: Verda Naturisma Semajno kun E-kursoj: gresillon.org/n
2025-okt-24/nov-02: AŬTUNAS, kursoj kaj FEI-ekzameno kun Renée Triolle: https://gresillon.org/au
Agendo de la sekvaj aranĝoj: gresillon.org/a
Kontakto: kastelo@gresillon.org

## Oproep voor bijdragen

Elk lid van Esperanto Nederland houdt zich op zijn of haar manier bezig met Esperanto, variërend van het bestuderen van de grammatica, het schrijven van gedichten of andere teksten, tot het ontmoeten van andere esperantisten, fysiek of op sociale media. We roepen je op om je ervaringen met ons te delen. Je verhalen zijn meer dan welkom, zowel in het Esperanto als in het Nederlands. Stuur ook foto's mee.

Grammaticale fouten corrigeren we. Inkortingen en andere aanpassingen doen we zo veel mogelijk in overleg. Wanneer je wilt, kunnen we ook een interview houden. Neem bij langere teksten eerst even contact met ons op. Stuur je bijdrage naar:
redakcio@esperanto-nederland.nl




## La Komencinto

*Teksto kaj desegnoj: Thijs van Viegen*



# Studieweekend in april



Ook in april 2025 gaan we weer naar het natuurvriendenhuis Krikkenhaar in Bornerbroek.
De data zijn **4-6 april 2025**.

Zoals gebruikelijk zullen de cursusniveaus variëren van absolute beginners tot gevorderden. De nadruk ligt op het oefenen van het spreken van Esperanto. Elke docent geeft les aan een groep. Het niveau verschilt per groep. In 2025 wordt de deelnemersprijs niet verhoogd. De kosten zijn € 100 voor leden van Esperanto Nederland, NEJ of een andere landelijke Esperanto-organisatie. Anderen betalen € 110. In de prijs zijn inbegrepen: lessen, overnachtingen, maaltijden, koffie en thee. Meer informatie en het aanmeldingsformulier kan je vinden op onze website:
esperanto-nederland.nl/studieweekend.

**Extra nacht in Krikkenhaar mogelijk.** Ook in april 2025 hebben we het huisje 't Krikske gehuurd om les te geven. We hebben het huisje ook gehuurd van zondagmiddag op maandagmorgen, omdat we op zondag lesgeven tot 15.00 uur. Wil je een extra dag genieten van de omgeving? Uitrusten van de lessen? Dan heb je nu de mogelijkheid. Er zijn drie slaapkamers, met elk twee bedden, een keuken, woonkamer, wc/douche. Het kost je maar een paar euro. Je familie en vrienden mogen ook gebruik maken van deze overnachting op zondag naar maandag. Vraag ons om meer informatie.

**Op den Haar.** Wil je tijdens het studieweekend meer privacy? Een eigen slaapkamer? Denk dan eens aan het tweede huisje dat op het terrein staat. Het huisje heet 'Op den Haar'. Er zijn twee slaapkamers en heeft eigen ruimten. Als je dit iets lijkt neem dan rechtstreeks contact op met de beheerder van Krikkenhaar. Je regelt dit zelf, ook de betaling. Als je het alleen huurt, is het misschien iets te duur, maar als je met een kennis iets regelt, dan is het wel betaalbaar. Het gaat buiten Esperanto Nederland om. Je neemt verder gewoon deel aan het lesprogramma en maaltijden in het hoofdgebouw. Je krijgt geen korting op de deelnemersprijs van het studieweekend. Twee deelnemers, die deelnamen aan het november-weekend, hebben dit al samen geregeld.

Vind je april nog ver weg en wil je al eerder een cursus volgen? Ga dan op 21 februari t/m 23 februari 2025 naar Ieper (België). Onze Vlaamse collega's gaan ook studie-weekends organiseren. Meer informatie op Eventa Servo.

Tot ziens in Krikkenhaar,
*Lilian, Arjen-Sjoerd en Ineke*
studosemajnfino@esperanto-nederland.nl

**Fenikso**
Jarkolekto 30, n-ro 1
Januaro - Februaro 2025

PostNL
Port Betaald
Port Payé
Pays-Bas

**eventueel retouradres**: Esperanto Nederland Ledenadministratie, Vaartweg 24G, 8382 EB Frederiksoord